

Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, DECEMBRO 2009, JARKOLEKTO 27

Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@bigpond.com

Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Deziras al vi ĉiuj Bonan Kristnaskon kaj feliĉan novan jaron ne nur Virginia, Audrey, Colin, Ida Yota, kaj Pat Nunn, sed ankaŭ ĉiuj aliaj membroj kaj simpatiantoj de "Esperanto en Sudaŭstralio.



Invitis Petro sian patrinon veni por preni parton en vespermanĝado. Dum la manĝado la patrino rimarkis, ke Johanino, la junulino, kun kiu Petro dividas la loĝejon, estas eĉ tre belega. Dum la vespero ŝi rigardis la du gejunulojn kaj scivolis, ĉu estas io pli intima inter la du ol ŝi rajtus scii. Demandite Petro diris: "Mi certigas vin, ke Johanino kaj mi estas nur kunloĝantoj ĉi tie."

Proksimume unu semajnon poste, Johanino diris al Petro: "Ek de kiam via patrino kunmanĝis kun ni, mi ne povas trovi la fritilon, ĉu vi supozas, ke via patrino akcidente kunprenis ĝin kun si, kiam ŝi foriris?"

"Nu, mi tion dubas, sed mi sendos al ŝi retmesaĝon nur por certigi," respondis Petro. Li skribis: "Kara Patrino! Mi ne diras, ke vi prenis la fritilon for de mia luloĝejo, kaj mi ne diras, ke vi ne forprenis ĝin, sed restas la fakto ke ĝi estas netrovebla ek de kiam vi estis ĉi tie por vespermanĝi. Elkore, Petro.

Plurajn tagojn pli poste venis retmesaĝo de lia patrino: "Kara Petro! "Mi ne diras, ke vi amoras kun Johanino, kaj mi ne diras, ke vi ne amoras kun ŝi, sed la fakto estas, ke se ŝi dormus en sia propra lito, ŝi estus trovinta la fritilon antaŭ longe. Elkore, Panjo.

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 2an de decembro je la 18a horo, okazos renkontiĝo en la skatolfabriko.

Sabaton la 12an de decembro, je la 17a horo, ĉe Indrani, ni festos la 150-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. Ni petas vin kunporti iom da manĝaĵo kaj trinkaĵo plus etan donacon okaze de la naskiĝtago de la Majstro !

La AEA-somerkursaro okazos en Sidnejo de dimanĉo la 10a ĝis lundo la 25a de januaro 2010.

La Novzelanda Kongreso okazos en Velintono de mardo la 26a de januaro 2010.

La UEA-kongreso de Esperanto okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

Inter la 9a kaj 23a de julio 2011 la AEA-kongreso okazos en Adelajdo. Kiel sciante, la unua

AEA-kongreso okazis en belega Adelajdo en la benita jaro 1911.

Universala Esperanto-Asocio kongresos en 2011 en Kopenhago. Kia bonŝanco, ĉu ne? Ni estos devigataj elekti inter du el la plej belegaj urbegoj de la mondo !!!

Eta heliketo, kies nomo estas Vilburo, petegas sian patrinon pri permeso transkuri al la alia flanko de la vojo kaj reen.

Respondas la patrino: "Ne nun, eta Vilburo, ĉar la buso venos jam post nur du horoj!"

La Piramido de Bona Volo

Kiel vi ĉiuj devus scii, la Piramido de la La Bona Volo datrevenis en oktobro. Nun ĝi aĝas 20 jarojn kaj du monatojn.

La Bona Volo estas io, kion ni ĉiuj devus provi ĉiutage imiti. Laŭ mia opinio la tuta mondo bezonas plibonigon, kaj fakte estas ni, kiuj respondecas pri tiu plibonigo. Ne atendu, ke la registaroj ion faros. Mi sentas, ke kiel esperantistoj kaj civitanoj de la mondo, ni devas fari ĉion eblan por plenumi tiun taskon, kiu fakte estas nur unu el niaj multaj gravaj devoj por la avantaĝo de la homaro .

La Bona Volo okazigis, okaze de la datreveno, tre grandan feston kaj la tuta afero estis eĉ tre grandega evento. Miloj da homoj ĉeestis kaj partoprenis en la festo preĝante kaj kantante. Gvidis la grandan feston la mirinda s-ro Paiva Netto. Decas aldoni, ĉu ne? ke la Piramido estas ankaŭ Esperantujo, ĉar ĉiam vizitas ĝin multaj esperantistoj. Ĉu mi rajtas rekomendi al vi ĉiuj, tuj kiam vi havos ŝancon, iri viziti Braziljon kaj tiun jam mondfaman Piramidon !

En la komenco de la 19a jarcento okazis ĉevalbazaro apud la stacidometo en iu malgranda vilaĝo. Subite la staciestro elvenis kriegante: "Vi devas movi la damnitajn ĉevalojn, ĉar terure fetoras en nia dormoĉambro."

Aŭdiĝis voĉo el la homamaso: "Ĉu vi vere kredas, ke tio ĝenas la ĉevalojn?"

Pri nia kunkantado

La jam tradicia kantvespero okazis ĉijare la 24an de oktobro en la hejmo de Indrani en Mawson Lakes. La temo de la aranĝo estis la granda vojaĝo de Indrani tra pluraj eŭropaj landoj, kadre de kiu ŝi vizitis ankaŭ la bjalistokan UK-n. Ŝi elektis repertuaron de 21 kantoj, kiuj devenis el la landoj de ŝi vizititaj: Pollando, Norvegujo, Rusujo ktp.

Pluraj el tiuj kantoj estis al ni malmulte aŭ tute ne konataj, sed la organizantino celis ĝuste tion, ke ni lernu novajn kantojn. Ni ne kontraŭis, ja eĉ se ni ne estas elstare bonaj kantantoj, ĉiu el ni ŝatas kanti. Havi pianakompanion de Indrani kaj la mandolinbanĝon de Bob multe agrabligis la sperton. Dankon al ili ambaŭ pro la ĝuplena vespero.

Katja

Parolas inter si du viroj. Diras unu el ili al la alia: "Vidu tiujn du virinojn. La brunharulino estas mia edzino kaj la blondulino estas mia amantino!"

Respondas la dua viro al la unua: "Ho, tre interese, tio, kion vi ĵus diris, validas ankaŭ por mi, sed inverse!"

Pri la novembraj aktivecoj en Adelajdo

Ŝajnas ke novembro estis eĉ tre bona kaj amuza por Esperanto en Sudaŭstralio.

La 4an ni revidis nian bonegan amikon, Charles Stevenson, kiun ni konas nin en la Skatolfabriko, rakonto pri sia vojaĝo al nin, aŭ almenaŭ sin, per skandinavo.



ek de 1974. Li vizitis kie distris nin Pat per Francujo. Bob ridigis priskribo de la

La 7an ni ĉiuj, kun kelkaj invititaj neesperantistoj, provis ĝuste respondi al lia hejmo. Partoprenis esperantistoj, eble eĉ 12. Stevenson. Charles



demandoj de Trevor en proksimume dek unu Ĉeestis ankaŭ ges-roj Stevenson estas

malnova esperantisto, kiu ne uzis la lingvon la pasintajn dek

jarojn, sed li ankoraŭ bone, eĉ bonege memoras ĝin. Ĉeestis ankaŭ tute nova esperantistino Heather Furby. Belega nomo, ĉu ne? Preskaŭ Felby. Ili ĉiuj bonege respondis al la plej multaj demandoj, nur mi ne, kompreneble, mi ne povis ĝuste respondi. La demandoj estis plejparte prihistoriaj, prigeografiaj, kaj priesperantaj. Inter la prigeografiaj demandoj estis tiu, "en kiu numero de Vicar Strato loĝas la ge-Steeloj". Bone ke preskaŭ ĉiuj el ni scias tion, ĉu ne? escepte de mi, kompreneble, kredis, ke ili loĝas en n-ro 7, sed alveninte al Vicar Strato, mi baldaŭ rekoniĝis ilian domon. Ĝi estas tiu kun la puraj fenestroj. Se mi ne estus rekoninta ĝin, Audrey kaj mi ne povus esti partoprenintaj kaj tre ĝuindan kaj tre posttagmezon. La agrablan pli kleraj memorkapablo de niaj geamikoj estas multe pli bona ol tiu de mi. La posttagmezo estis tre bona, ĝuinda kaj instrua. Ankaŭ tio estis tre amuza.



Ni ankaŭ ne forgesu la ĉiusemajnajn renkontiĝojn de nia Legorondo. Tiu regule daŭras jam plurajn jarojn. Unue ni renkontiĝis ĉiun ĵaŭdon en unu el la kunvenejoj apartenantaj al la ŝtata biblioteko en Nordteraso. Tie ni legis kelkajn el la multaj libroj verkitaj de Trevor. Sed ne nur tiujn. Ni legis ankaŭ aliajn, kompreneble, ankaŭ tiun verkitan de Anna Löwenstein "La ŝtona muro". Ĝi estas bona kaj priskribas la vivon de juna sklavino el ie en Anglujo, kiu estas kaptita de la romiaj soldatoj kaj devigita pasigi la ceteron de sia vivo en Romo.

Ni kutime komencas la legadon per laŭta kantado de Esperanto-kantoj akompanata de mandolinbanĝo. Tio bedaŭrinde ne daŭris tre longe, ĉar iu virino plendis pri la bruoj. Ni pardonis ŝin kaj daŭrigis la kantadon sen mandolinbanĝo. Ĉiu legonto elektas sian preferatan kanton, kiu malsamas de semajno al semajno.

Sed ho ve! La bona lernejo, en kiu instruas Trevor, decidis, ke la ĉiusemajna libertago de Trevor ne plu estu ĵaŭdo, sed merkredo. Lernejestroj ankoraŭ havas iom da potenco, ĉu ne? Mi do erare kredis, ke nur la lernejoj havas potencon.

Preskaŭ samtempe plimalboniĝis la sanstato de nia bona amiko, Arturo. Necesis ke li loĝadu en speciala hejmo por malsanuloj. Li do ne plu povas iri al la biblioteko. Sed lia bona edzino, Libby, veturigas lin ĉiun tagon ien en la bela urbo. Kaj nun ĉiun merkredon ŝi veturigas lin hejmen al si por ke li ankoraŭ partoprenu la Legorondon. Li vere, same kiel Libby, tre amas, eĉ amegas, Esperanton kaj evidente ne povas vivi sen ĝi.

Sed kompreneble estus multe pli bone, se ni povus renkontiĝi en la flegejo, kiu fakte nomatas Flegejo Morphet. Tiam estus iom pli facile por kaj Libby kaj Arturo. Estas decidite, ke ni provu havigi legorondejon tie. Plej verŝajne venontan semajnon ni do renkontiĝos tie je la 11a horo en Flegejo Morphet, 52 Esplanade, Semaphore.

Nuntempe ni legadas la bonan verkon de Wendy Heller "Lidia, la vivo de Lidia Zamenhof, filino de Esperanto". La libro certe estas bonega kaj leginda. Enestas en ĝi multegaj bildoj pri la historio de Esperanto. Pri ĝia traduko el la angla respondecas Bernhard Westerhoff.

Se iuj esperantistoj ŝatus legadi kune kun ni en la Legorondo, ili sciu, ke ankaŭ ili estos eĉ tre bonvenaj!

Estis maljunulino kaptita de policisto, ĉar ŝi ŝtelis ladskatolon da persikoj. Al la juĝisto ŝi petis pardonon dirante: "Mi bedaŭras, sed ni havis nenion por manĝi."

Demandis la juĝisto: "Kiom da persikoj estis en la ladskatolo?"

"Ses, via juĝista moŝto".

"Vi havas tre malbonan reputacion pro via daŭra emo al ŝtelado", diris lia juĝista moŝto. Vi devos pasigi ses tagojn en la malliberejo, unu tagon pro ĉiu persiko".

Tiam ekstaris la maljuna edzo de la maljunulino kriegante: "Sed ŝi ŝtelis ankaŭ ladskatolon da pizoj!"

Ĉu la bretona lingvo estas artefarita same kiel Esperanto?

La bretona estas kelta lingvo, kiu similas al la kimra lingvo parolata en Kimrujo, kaj al la kornvala lingvo parolata en Kornvalo en la sudokcidenta angulo de Britujo. En la printempo de 2008, oni taksis, ke nur 2000 homoj flue parolas la kornvalan.

80% de la denaskaj parolantoj de la bretona lingvo jam estas pli ol 60-jaraj, do estas timo, ke malpli kaj malpli da personoj scipovos la bretonan.

Tamen estas nun lernejoj, kiuj instruas la bretonan. En ĉi tiu lernojaro 13.077 lernejoj estas en dulingvaj franca-bretona klasoj, kio estas kresko de 6,1%, la plej bona rezulto de post 2004. Tamen, tio ankoraŭ ne sufiĉas por garantii la estontecon de la bretona lingvo. Unesko proklamis, ke la bretona lingvo estas en danĝero de malapero.

Entute, nur 6% de la lernejoj en Bretonujo proponas dulingvajn programojn. Tio ne estas multo kompare kun tio, kio okazas en aliaj regionoj por aliaj lingvoj. En Eŭskujo pli ol 50% el la lernejoj proponas dulingvan programon. Eĉ en Alzacujo la situacio estas pli bona ol en Bretonujo. En granda urbo, kiel Strasburgo, ekzistas 13 publikaj lernejoj kun dulingva programo. En Rennes estas nur du tiaj lernejoj. Rennes estas la bretona urbo, en kiu estas la plej multaj dulingvaj lernejoj: 574.

Tamen la situacio iom pliboniĝis: Duoble pli da gejunuloj inter 15 kaj 19-jaraj parolas la bretonan ol inter la grupo de 20-35 jaruloj.

Dum la lastaj 10 jaroj ni perdis 100.000 parolantojn de la bretona, kaj ni gajnas nur proksimume 1000 parolantojn jare. Do kial ni ne havas pli da infanoj, kiuj lernas la bretonan? Ĉu kulpas la gepatroj? Ŝajne ne!

En unu antaŭlernejo sude de Rennes 49 infanoj enskribiĝis por klaso kun nur unu instruisto, sed la inspektoro de la akademio, Jean-Charles Huchet, rifuzis malfermi duan klason. La gepatroj protestis kun la slogano "Niaj infanoj ne estas sardinoj."

Sed s-ro Huchet diris, ke estas tro malfacile trovi instruistojn. Li eĉ aŭdacis diri, ke la bretona lingvo estas

artefarita lingvo kaj do supozeble ne meritas esti instruata. Tiu komento pri la artefariteco de la bretona lingvo ne estis bone akceptita. Ĝi ne povas esti konsiderata kiel politike neŭtrala eldiro. Sekve al tiu rimarko iuj demandis ĉu ankaŭ niaj infanoj estas artefaritaj? Do de kie venas tiu ideo, ke la bretona estas artefarita? Supozeble pro la deziro unuigi la diversajn dialektojn kaj unuigi la skribmanieron. En 1941 Roparz Hemon ja efektive kreis unuigitan skribmanieron.

Kompreneble iuj argumentis, ke ankaŭ la franca lingvo multe ŝanĝiĝis, modernigis, ĉu do oni devas nomi la francan lingvon artefarita lingvo? Ĉiukaze por esperantistoj la vorto artefarita tute ne estas malbona vorto, sed tamen por multaj bretonoj ĝi ja estas mallaŭda. Ankaŭ la esprimo novbretona lingvo estas mallaŭda. Tamen iuj uzas ĝin nun por priskribi la lingvon parolatan ne denaske.

Do mi ne vere scias, kia estos la estonteco de la bretona lingvo.

Nicole Else

*Viro surhavas gipsobandaĝon sur sia kruro.
Demandas lin lia amiko: “Kiel vi frakturis vian kruron?”*

”Ĉu vi vidis la ŝtupojn tie antaŭ la enirpordo?”

”Jes”.

”Mi ne”.

Feliĉan Novan Jaron

Kiel vi vidas, ne restas multe da blanka papero en ĉi tiu Tamen Plu. Mi do decidis sur la lastaj malmultaj linioj provi sincere esprimi miajn plej bonajn dezirojn por la nova jaro, 2010, se mi ankoraŭ scias kalkuli. Do en la nomo de ĉiuj esperantistoj sudaŭstraliaj, mi deziras al vi ĉiuj eĉ tre bonegan kaj prosperan Novan Jaron kun harmonio, pacamo, solidareco, kunhelpemo kaj laboremo inter ni ĉiuj. Do bonan, eĉ bonegan Novan Jaron 2010 !